

Babilada rondo

... okazos je la 19-a, vendrede ...



la 28-an de februaro

ĉe Gilbert Darbellay

ch. de l'Orme 6, Morrens
021 732 23 22 aŭ 079 315 14 13



La 14-an de marto

ĉe M.-A. kaj Knud Sunier

Av. des Alpes 150, Montreux
Tél. 021 961 38 56



La 28-an de marto

ĉe Cléa Robin

Ch. du Culat 20, Vouvry
024 481 33 06 aŭ 079 330 04 03

Ne forgesu enskribiĝi ĉe
<http://doodle.com/teum7w3gz46vdy6>

Citaĵo

Kiu donas, devas neniam memori.

Kiu ricevas, devas ĉiam memori.


Rabena proverbo



Deklaro

Ne necesas al mi pravigi, kial mi diras ion. Tio estas interese, kiam oni estas Prezidento. Ofte iu devas motivigi, kial li diras ion al mi, sed mi mem sentas neniam, ke mi devas klarigi.

G. Bush jr, US eksprezidento



Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22

+41 (0)76 411 14 55 * +41 (0)21 647 29 28

esperanto@citycable.ch * www.esperanto.ch/Lausanne

Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte

Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin *

076 411 14 55 - Kasisto.: Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Informilo

Marto 2014 - n° 3

Lunde, la 3-an de marto 2014

je la 20-a, ĉe la unua etaĝo
de la laŭzana stacidoma bufedo

**Charlotte Blanc Maillard parolos
al ni pri sia vojaĝo tra Ĉinio**

Lunde la 7-an de aprilo

Vi estas invitataj cerbumi kun ni pri propagando.


Lunde la 5-an de majo

Sylvain kaj Sarah Meigniez prelegos pri sia vojaĝo

Sabate la 28-an de junio

Jara ekskurso organizota de Charlotte Blanc Maillard

Somera paŭzo



Lunde la 1-an de septembro

Decidota

Laŭzana Esperanto - Societo

Jules Verne kaj Esperanto

Vojaĝo al la Luno, krozoj en la abismaj profundoj, novaj energioj, gigantaj kanonoj kaj strangaj maŝinoj, la scienca mirindeco de "Eksterordinaraj vojaĝoj" de Jules Verne antaŭvidis multon.

Oni malpli scias, ke la mireginda anticipanto, je la fino de sia vivo, entuziasmiĝis por la ideo de universala lingvo kaj pli precize por Esperanto, kies bazojn Doktoro Zamenhof publikigis en 1887.

Jam, en "Dudek mil mejloj sub la maroj", la kapitano Nemo kaj lia ŝipanaro uzis misteran idiomon kaj en "La eterna Adamo" Jules Verne skribis pri la lingvo de niaj malproskimaj idoj de futura Atlantido.

Jam ankaŭ, dum la jaroj 1880, Jules Verne aŭdis paroli pri Volapuko, la efemera antaŭ-pioniro de Esperanto, konversaciante en sia jaĥto la "Saint-Michel" kun sia amiko, la juna deputito Raoul Duval, arda partizano de tiu idiomo, imagita en 1879, de germana prelato, J. M. Schleyer.

Je la komenco de 1903 esperantista grupo estis kreita en Amiens, kie Jules Verne loĝis, dank'al la impulso de sinjoroj Charles Tassencourt, negocianto, amiko de la verkisto kaj Joseph Dellour, subestro de liceo.

Interrompita romano

Jules Verne akceptis kun entuziasmo la prezidantecon de tiu nova grupo kaj promesis al siaj amikoj skribi romanon, en kiu li priskribos la meritojn de Esperanto. La verkisto komencis la

laboron sed lia morto, la 24an de marto 1905, interrompis lian verkon...

La skizo estis uzita por la redakto de la romano "la miriga aventuro de la Misio Barzak", kies unua parto ĝi estas kaj kiu estis finverkita de Michel Verne, filo de la verkisto, el la notoj lasitaj de lia patro, sed... en tiu verko eldonita en 1919 oni ne plu trovas aludon pri Esperanto!

La afero reaperis kiam, en 1981, la urbo de Nantes akiris multajn neeldonitaĵojn, restintajn en la arkivoj de Jules Verne. Ilia aktuala publikigo ebligas malkovri, ke unu el tiuj manskribaĵoj estas la komenco de "Vojaĝo de studo", la fama romano, kie Jules Verne deziris doni rolon al Esperanto.

Tiuj manskribaĵoj estas eldonitaj en pluraj volumoj, de la eldono "Editions du Cherche-Midi" kaj "Vojaĝo de studo" ĵus aperis en la volumo "Sankta Karlo" ("San Carlo"), titolo de unu el la tekstoj de la libro.

Tiu rakonto prezentas la membrojn de stud-komisiono, sendita en la kernon de Afriko kaj kiu konsistas interalie el Ruso, Nikolao Vanof, komisiita por instrui Esperanton al la membroj de la ekspedicio.

La verkisto provizore lasis blankaj en sia manskribaĵo la tekstojn tradukendajn poste al Esperanto, imaginte ke *"Esperanto, de pluraj jaroj, eniris la vastajn regionojn de centra Afriko, por la plej granda profito de la civilizo kaj de la komerco."*

Finfine, lia antaŭscio de anticipanto eble ankoraŭ ĝuste vidis por la estonteco, ĉar de kelkaj jaroj asocioj de Esperanto-parolantoj kreiĝas en diversaj landoj de Nigra Afriko.